3-a Jaro. N-o 52 (102) APERAS SEMAJNE 9. Septembro 1926



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY 14, Avenue de Corbéra, Paris-XII^e	Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, Rue Boyer, Paris-XX^e	Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig O 27

Publika letero de francia SAT-ano al lia dolara moŝto Coolidge

Sinjoro Prezidanto Coolidge,
(Kuliĝ)

Antaŭ kelka tempo, skribis al vi la maljuna Clemenceau (Klemanso), la homo kiun oni nomis «La Tigro» pro lia atakemo parola. La kaduka ŝtatisto trovis ankoraŭ sufiĉe da energio por vipi belstile la rabemon de la financistaro, kies dungito vi estas. Li diris kun indigna tono — ĉu indigno sincera aŭ nur ŝajna, mi ne scias, sed almenaŭ konstatebla en lia letero — ke «Francio ne estas vendebla, eĉ al siaj amikoj. Sendependa ni ricevis ĝin; sendependa ni forlasos ĝin...

Ni ĵetis en la abismon, daŭrigas la fama franca patrioto, ĉion: la sangon kaj la monon... Venu en niajn vilaĝojn por legi la senfinan liston de niaj mortintoj... ĉu tio estas konto de banko, la viva forto de tiu junularo buĉita...?»

Tiaj akraj paroloj kredeble vekis ĉe via dolara moŝto, nur kompateman rideton por la malsaĝa kadukulo, kiu cinike konfesas, ke li konsentis kaj instigis dum kvar jaroj la buĉadon de la franca junularo — kaj tio por konservi la sendependecon de Francio.

Kaj jen hodiaŭ nia Ugolino *) — Klemanso ekkonstatas, ke la «amikoj» minacas la *sendependecon* de Francio same kiel faris la «malamikoj» antaŭ 12 jaroj!

Kaj ne nur la fama patrioto-junularmanĝanto indignas pro la postuloj de viaj mastroj pri pago de militŝuldo, sed ĉiuj francaj politikuloj, eĉ laboristaj gvidantoj: Ni ne konsentu liveri «nian landon» al la usona imperialismo, laŭte protestas ĉe kunvenegoj plej popularaj oratoroj. «La usonanoj volas rabi nian tabak-industrion», skribis antaŭ kelkaj tagoj iu deputito en tre maldekstra ĵurnalo...

Sinjoro prezidanto, permesu al mi diri, ke tiuj protestoj kaj babilaĉoj estas tre... naivaj, aŭ simple hipokritaj. Mi estas vere mirigita konstati, ke la voĉoj de laboristaj gvidantoj agordiĝas kun tiu de la sangomakulita «Tigro».

Tial iom senĝene mi decidis skribi, por konigi al vi la opinion de simpla laboristo pri la demando, kiu tiom incitas la francajn diverspartiajn gvidantojn.

Mi ne estas kompetenta rilate ekonomiajn demandojn. Tamen mi scias, ke la stulteco kaj krimeco de la eŭropaj ŝtatistoj okazigis, ke la milito ebligis al Usono akiri la duonon de la oro el la mondo; ke via industrio nun produktas pli ol la duonon de kelkaj artikloj: 60,2 % de la krudfero; 59,8 % de la ŝtalo; 52,7 % de la kupro.

Nu, tiuj ciferoj estas por mi pli elokventaj ol ĉiuj sentimentalaj kaj belvortaj paroladoj. Via imperialismo ŝajnas al mi nun la pli forta kaj kapabla trudi sian volon al la disaj, etaj imperialismoj ĉi tieaj. Estas evidente, ke la eŭropaj fabrikoj malkapablas konkurenci sukcese vian industrion. Ili provas tion fari nur penante malaltigi nian salajron, plilongigi nian labordaŭron.

Bedaŭrinde la laboristaro eŭropa estas nur dise organizita, kaj sekve senforta por kontraŭstari la ekspluatemon de la ĉi tiea mastraro. Ne estas espereble, ke baldaŭ ni povos imiti niajn rusajn K-dojn. Do kion malpli malbonan ni povas nun deziri? Nur unu aferon: havi dungantojn, kiuj teknike kapablas mastrumi pli bone, pli science ol tiuj, kiuj nin nun ekspluatas. Racie ni povas nur deziri, ke la usonaj inĝenieroj kaj produkt-organizistoj venu ĉi tien, invadu Francion, Hispanion, la tutan Eŭropon kaj kreskigante la industrion tiele plirapidigu la historian proceson, kiu, laŭ la diroj de K. Marks, devas nepre,

*) *Ugolino*. Italia tirano, kiu vivis en la XIII-a jarcento. Enfermite de sia malamiko, la ĉefepiskopo Ubaldini, en turon kun siaj du filoj por ke ili tie malsatmortiĝu, Ugolino unue manĝis siajn du filojn kaj tiele povis vivi pli longe. Same la patrioj jetas en militon siajn filojn por daŭrigi sian ekzistadon.— Ni aldonas ĉi tiun klarigon ne en la intenco instrui la usonan prezidanton, sed kelkajn legantojn, kiuj eble ne scias detale la historion de Italio. — *Red.*

fatale konduki al starigo de socialisma reĝimo.

Bonvolu do, via dolara moŝto Kuliĝ, ne atenti la sentimentalajn babilaĉojn de niaj diverspartiaj politikuloj. Kiel Klemanso mi diros: venu ĉi tien; venu ne por legi la liston de liaj viktimoj, sed por organizadi science, malrutineme, grandskale la produktadon.

Ni scias, ke la vivnivelo de la usonaj laboristoj estas pli alta ol la nia. Kial do ni timus? Se ni ne volas batali por konservi al Francio ĝian sendependecon, ĉar tio signifas permesi, ke nur la francaj mastroj ekspluatadu nin, ni almenaŭ estas pretaj bataladi kuraĝe por atingi, ke nia vivnivelo estu same alta kiel tiu de niaj usonaj K-doj. Kaj kiam ĉi lastaj decidos batali por forigi ĉian ekspluatecon, ni ankaŭ estos pretaj partopreni tian batalon. Ni nur ne konsentas morti pro iaj ajn patriaj interesoj.

La superregado de via juna imperialismo ŝajnas al mi malpli malbona, mi ne diras pli bona, ol la eŭropaj inter si batalantaj, malfortaj imperialismoj. Tial mi petas, ke vi ne atentu la sensencajn ĝemadojn pri sendependeco nacia kaj similaj mistifikaĵoj.

Invadu Francion! la tutan Eŭropon, — nur ne tuŝu Sovetion...

Mi petas pardonon, ke eble mi faris leteron pli longan, ol tiu de lia tigra moŝto Klemanso. Sed vi ja komprenos, ke mi estas nur laboristo kaj sekve ne havas lian verko-kapablecon por povi diri multon en malmulte da vortoj.

Dume, bonvolu akcepti, via dolara moŝto, mian sennaciulan saluton.

EŬTRAPEL.

Ĉie, ĉiuj varprezoj plialtiĝas..., escepte la prezo de "Sennaciulo" kaj de "Sennacieca Revuo". — Nekredeble, sed tamen vere. Kaj krome ni donacas premion al la novaj abonantoj kaj abon-varbantoj.

La faŝismo aperas en Svedio

Sekreta faŝista organizaĵo, jam de longe ekzistanta, nun fine estas senvualigita. Ĝia nomo estas: «Svenska Fascisternas Kamporganisation» (S. F. K. O. Sveda batalorganizaĵo de la faŝistoj). Ĝia ĉefkontoro sidas en Stockholm kun sekcioj en la lando; ĝi kunlaboras en kontakto kun strikrompistaj organizaĵoj.

Multiuj opiniis, ke la faŝismo ne havas lokon en Svedio, sed la realo montras la kontraŭon. Ankoraŭ ĝi estas malforta, sed povas kreski, kaj por la gelaboristoj, estas necese ke ili bone observu kaj sin gardu kontraŭ tiu ĉi nova malamiko.

Nun la faŝistorganizaĵo fanfaronas, ke multaj laboristoj aliĝis.

Sed estas nur individuoj ekstermoralaj kaj tre stultaj, kiujn oni sukcesas kapti per ĉi insidilo. La svedaj laboristoj ĝenerale certe ne lasas sin kapti en tian kontraŭproletan maŝkaptilon. Sed el la mezkaj superklasoj la faŝismo ĉi-tiea povas ricevi forton kaj fariĝi danĝero por la laboristoj, se ili ne ĝustatempe energie kontraŭbatalas ĝin.

994.

☆ DISKUTEJO ☆

Ĉu Marks eraris?

(*Daŭrigo* *)

La signifo de la Marks'a teorio por la laborista movado

Por la plej granda parto de la nuntempa generacio *socialismo* kaj *laborista movado* estas preskaŭ samsignifaj. Ni ĉiuj kutimiĝis vidi la socialismon kiel celon de la diversaj laboristaj organizaĵoj, kaj aŭdi el la buŝo de ĉiuj klaskonsciaj laboristoj, ke ili batalas por la efektivigo de socio sur kolektiva, socialista bazo. Laboristoj aŭ laboristaj organizaĵoj nesocialistaj estas escepto, senespera malplimulto, same kiel socialistaj tendencoj aŭ organizaĵoj ekster la proletaro preskaŭ ne ekzistas. Ankaŭ por la burĝaro, tiuj du vortoj havas saman sencon. La blanka teroro de ĉiuj landoj persekutas la socialistan ideon en la personoj de laboristoj, ĉar prave ili estas konsiderataj kiel la reprezentantoj de nova sociordo sen ekspluatado.

Sed ne ĉiam laborista kaj socialista movadoj estis tiel intime kunligitaj.

Jam en malnovaj epokoj, longe antaŭ la apero de l' moderna proletaro industria, ekzistis socialistaj tendencoj kaj sistemoj. En Ĉinio, multajn jarcentojn antaŭ nia tempokalkulo, ekzistis socialistaj teorioj kaj unu imperiestro eĉ penadis ilin realigi per dekretoj. Konataj estas la komunistaj utopiaĵoj de Platono en antikva Grekio, komunistaj aŭ socialistaj sistemoj de filosofoj ĉiuepokaj, la fama «Utopio» de la anglo Thomas Moore (elp. Tomas Mur) en la XVI-a jarcento. La unuaj eminentaj socialistoj de la XIX-a jarcento ĝenerale konataj kiel «utopiistoj» — Owen (Oin), Fourier (Furie) kaj Saint-Simon (San-Simo) — havis neniun rilaton kun la proletaro; ili konsideris tiun klason ne kiel efektivigonton de la socialistaj projektoj, sed kiel kompatindan, mizeran amason, kiu bezonas savontojn — kaj la utopiistoj deziris esti tiaj humanuloj, alvokante eĉ kompaton, indulgon kaj helpon de la reganta klaso por la starigo de la nova ordo.

Aliflanke, la unuaj paŝoj de la moderna proletaro sur la scenejoj ekonomia kaj politika tute ne estis animataj de socialista spirito. La unua ekmovo de la laboristaro, en Anglio, dum la XVIII-a jarcento estas la batalado kontraŭ la maŝinoj, la malespera krio de la «maŝindetruantoj», senlaborigitaj per la maŝinoj kaj venĝantaj sian malfeliĉan sorton per netaŭgaj rimedoj. Ni renkontas poste en la historio de l' proletaro, la francajn silkoŝpinistojn de Lyon, en ribelo kontraŭ la kapitalo, sen socialista celo (1831), kaj la anglan laboristaron en potenca movado politika («ĉartismo») por la ĝenerala balotrajto (1838-1848). Estas kompreneble, ke la unua elpaŝo historia de la proletaro ankoraŭ ne povis esti direktata al socialismo. La laborista klaso nur komencis ekribeli kontraŭ siaj katenoj, postulante rimedojn kaj helpon nur kontraŭ siaj plej brulantaj mizeroj. Ĝi ne povis jam krei al si propran, socialistan ideologion, ĉar tiam la regantaj klasoj ĝin tenis en plena mallibereco kaj malklereco. La socialista armilaro de la proleta klaso devis esti forĝata ekster ĝi kaj de homoj al ĝi ne apartenantaj.

Ni trovas do dum la unua duono de la pasinta jarcento, laboristan movadon kun mallarĝaj, tuj-efektivigeblaj celoj unuflanke, kaj aliflanke socialistajn sistemojn kaj projektojn en la kapoj de neproletoj, por kiuj la laboristaro estis objekto, kaj ne subjekto en iliaj celadoj. Tute nature, tiuj utopiaj projektoj ne havis ian perspektivon por efektivigo. Depost jarmiloj, filozofoj starigis komunistajn sistemojn, kiuj ĉiuj restadis sensukcesaj. Kial, sekve, la projektoj de la grandaj utopiistoj devus ĝuste havi pli da bonŝanco ol tiuj de la antaŭaj reformemuloj? La tuta historio estas plena je vanaj penadoj por enkonduko de socialistaj aŭ komunistaj sistemoj. La realigo de la novaj projektoj dependis same de la hazardo kiel tiu de la antaŭaj. Konsekvence la reprezentantoj de tiuj projektoj vokis al ĉiuj eblaj fortoj: al la «eternaj ideoj de justeco, egaleco ktp.», al la bona volo de la regantoj, al kompato kaj kaso de la burĝaro, al geniuloj, eĉ al dio. Kaj la unuaj

*) Komenco en la n-ro 98-99.

proletaj revoluciuloj kun komunistaj ideoj, Blanqui (Blanki) en Francio kaj Weitling (Vajtling) en Germanio, kiuj jam komprenis ke la laboristaro devas mem sin liberigi, serĉis tiun forton en bone organizita, preparita subita ekribelo de decida, energiega malplimulto proleta. Sed ili ĉiuj komune baziĝis sur la espero, ke iu hazardo ebligos al ili efektivigi iliajn projektojn jam antaŭe pretajn kaj detale ellaboritajn.

La finfina kunligo de socialismo kaj de laborista movado, la realigo de stato kiu al la nuntempularo estas same kutima kiel kunligo de suno kaj lumo, estas la merito de Karl Marks, fondinto de la *scienca socialismo aŭ komunismo.*

Ĝis Marks, la socialismo estis utopia projektaro, kies efektivigo dependis de la hazardo: de geniulo, de bonkora burĝo, de bonvola regnanto, de la realiĝo de « grandaj idealoj » aŭ de energio kaj kuraĝo de proleta konspirantaro. Tiu efektivigo povus sekve okazi en la jaro 2.000 same bone kiel en la jaro 4.000 aŭ 10.000 de iu ajn tempokalkulo. Por Marks, la socialismo estas la neevitebla celo kaj fino de la proleta liberigbatalado, de la laborista movado. La venko de l' socialismo dependas, laŭ Marks, ne de iu hazardo permesanta enkonduki tutpretajn projektojn, delonge ellaboritajn, sed de la evoluo de l' kapitalismo mem, kies koncentriĝo plimultigas kaj koncentrigas ankaŭ la proletaron, akcentigante la klasan kontraŭecon kaj kondukante fatale al la venko de la proleta arego, al la triumfo de l' socialista ordo.

La utopiaj socialistoj havis belajn projektojn, sed ili nenion sciis respondi al la demando: « Kio garantias al vi la sukceson, kiu devas efektivigi viajn ideojn? » Marks kaj la Marks'anoj respondas: La kapitalismo mem kreas « siajn proprajn enterigontojn, la modernajn proletojn ». Per sia propra evoluo, la kapitalista sistemo venos al punkto kie ĝi ne plu povos daŭri, kie la kolizio, la renkontskuo de la du grandaj klasoj: burĝaro kaj proletaro, detruos la burĝan ordon kaj la laboristaro nepre konstruos sian socialistan socion.

Tiel la marksismo donas al la laborista movado ĝian nepran certecon pri finfina venko, ĝian nevenkeblecon, malgraŭ kelktempaj malsukcesoj kaj ofta kruela persekutado. Nur tiu fera konfido je la fataleco de l' historia evoluo donas al ĝi la eblon, senhezite kaj senindulge kritiki la proprajn erarojn, ne timante la ĝojon kaj la mokon de la malamikoj: ĉar malgraŭ ĉio, malgraŭ malvenkoj kaj malliberejoj, malgraŭ sanga subpremo kaj sennombraj pendigiloj, la kapitalismo devas per sia propra disvolviĝo produkti ĉiam pli kaj pli multe da siaj propraj enterigontoj! Eĉ se la burĝaro milfoje triumfas kontraŭ nin, la finfina venko tamen estos nia.

(Pluo sekvos.) LUCIEN REVO.

★

Ĉu tio estas socialismo?

En la n-ro 39 de SENNACIULO mi legis pri salajrdiferencoj en Sovetio de 30 ĝis 400 rubloj. Tiu fakta sciigo treege mirigis min, kaj mi estus tre danka al niaj sovetiaj K-doj, se ili liverus pri tio klarigojn sur la paĝoj de nia gazeto. MONDHEJMUL.

EL LA VIVO KAJ SCIENCOJ

Sekreto de sibiria « Tajga » (1)

Forkurinto de « Blankoj ».

En Sibirio, antaŭ kelkaj jaroj, vagadis bandoj de Sjemenov, blankgvardia hetmano. Pro premado de la « ruĝoj », ili foriris pli malproksimen al la nordo. Vagadis en la « tajga » Sjemenov mem; finfine li forkuris en Japanion, sed la bando daŭris sian marŝadon tra la « tajga ».

La « tajga » norden etendiĝas je miloj da kilometroj ĝis la glacia maro. En multaj lokoj ĝi estas tute netrairebla, konsistanta el senfinaj marĉoj kaj densejoj en kiuj ankoraŭ ne paŝis homa piedo. La bando de Sjemenov dum unu atako kontraŭ siberia vilaĝo, militkaptis unu kamparanon, Ivanov, kaj trenadis lin kun si. Ili devigis lin kuiri por si la manĝaĵojn kaj servi diversmaniere, tenante lin preskaŭ 5 monatojn. La bando eniris en la « tajga » tiom malproksimen, ke ĝi estus perdinta la vojon, se Ivanov ne estis devigata montri ĝin.

Unu nokton Ivanov sukcesis forkuri de la blankbandanoj. Li komencis serĉi vojon hejmen, sed en la densejoj de la « tajga » perdiĝis. Ju pli malproksimen li iris, des pli li erarvagis kaj neniel povis eĉ kompreni, kien li devas iri. La « tajga » fariĝis pli kaj pli sovaĝa. Feliĉe li estis portanta kun li pafilon kun kartoĉoj; tio ĉi lin savis de la morto; li ĉasadis kaj per tio vivis.

Neatendita renkonto.

Subite unu tagon disiĝis la arbaroj kaj aperis malgranda herbejo. Ivanov vidis antaŭ si ian homon en stranga vesto, sidantan sur la herbo. Ŝajnis al li, ke tiu homo ne estas reala. sed fantazia, ĉar same vestis sin la homoj en tempo de Petro la Granda, antaŭ centoj da jaroj. La homo ankaŭ ektimis, vidante Ivanov'on kaj ekkris ion nekompreneblan.

Tiam la nekonatulo ekparolis kaj Ivanov kun malfacilo komencis kompreni la strangan dialekton, miksitan kun kuriozaj rusaj vortoj.

Kiam Ivanov rakontis, ke li estas sola kaj al neniu intencas fari malbonon, la nekonato kondukis lin profunden en la densejon laŭ iaj sekretaj vojetoj, kaj miregite, Ivanov ekvidis tutan urbon kun domoj kaj stratoj, sed ĉiuj ĉi domoj estis similaj al tiuj, kiujn vidis Ivanov ĉe bildoj de la epoko de Petro kaj Ekaterino.

Antaŭ tricent jaroj.

Kiam oni manĝigis Ivanov'on, maljunuloj sidigis sin sur diversajn benkojn kaj komencis lin demandi. Siavice Ivanov demandadis ilin kaj oni sciigis, ke loĝantoj de tiu ĉi urbo perdita en « tajga » venis antaŭ 300 jaroj ĉi tien kaj de tiam estas izolitaj de l' tuta mondo de unu flanko per la glacia oceano kaj de tri flankoj per netrairebla « tajga ». Ĉe ili konserviĝis ĉiuj moroj de tiu epoko. Tiajn vortojn, kiaj « samovar », « gurdo » ili ne konis. Ili daŭris vivi per tia vivmaniero, per kia vivis niaj prauloj antaŭ tricent jaroj.

Ivanov restis kaj loĝis inter ĉi tiuj strangaj homoj. Kiam li rakontis al ili pri la civila milito, pri ruĝoj kaj blankoj, pri tio, ke neniaj caroj plu ekzistas, ili ne konfidis al li kaj eĉ opiniis, ke li estas frenezulo.

Tamen al Ivanov ili baldaŭ kutimiĝis kaj ne forpasis eĉ tri monatoj, kiam Ivanov edziĝis kun iu fraŭlino ilia kaj akiris rajtojn en tiu ĉi urbeto, « gorodiŝĉe » kiel oni nomis ĝin.

En la urbo ĉiuj konstruoj estas el ligno; ĉirkaŭ la arbaroj (2) estas ankaŭ ligna «Kremlo» laŭ la modelo de ĉiuj malnovaj rusaj urboj.

Vivmanieroj estas severe patriarkaj, kaj kiam Ivanov komencis indigni pri multaj malsaĝaj kutimoj kaj kruelecoj, la maljunuloj minacis mortigi lin. Ili devigis, ke li lasu kreski sian barbon, ĉar razi, laŭ ilia opinio, estos peko, kaj kompreneble raziloj ne ekzistis en la urbeto.

Ivanov travivis tie preskaŭ tri jarojn, sed fine, maljunuloj-administrantoj volis lin mortigi, ĉar al ili ne plaĉis, ke Ivanov klerigis la junularon. Do, kune kun sia edzino, li forkuris.

Post malfacila vojaĝo tra la « tajga » post longa vico da diversaj spertoj, dum kiuj mortis lia edzino, Ivanov fine atingis vivlokojn. Li komunikis pri la « gorodiŝĉe » al la Akademio de Sciencoj, kiu nunsomere sendas ekspedecion por esplori pri tiu stranga kolektivo de homoj konservintaj dum tri jarcentoj siajn morojn kaj lingvon neŝanĝitaj. Ĉi tiu viva muzeo de antaŭa tempo prezentas en si grandan intereson por la scienco.

Elrusigis V. MELENTJED, Perm, U.S.S.R.

★

Restajo de arktika ekspedicio de 1845.

Antaŭ kelkaj tagoj profesoro Beattie (Biti), urba bakteriologo de Liverpool (Liverpul), malfermis tre rustitan metalujon, enhavantan bovaĵon, hermetikigitan antaŭ okdek-unu jaroj. Tio estis el la provizaĵoj de la Franklina ekspedicio 1845-a.

La Brita Militŝipara Regnafako, kiu ekipis la ekspedicion, provizis sufiĉe da bovaĵo por tri-jara vojaĝado. Franklin vojaĝis senrevene.

Por trovi kaj savi lin ekvojaĝis tridek-naŭ ekspedicioj. Dum iu el ili oni trovis amason da metalujoj — malfermitaj — sed kun la enhavo ankoraŭ netuŝita. Estis eldirata, ke la pli granda parto de la bovaĵo estis putranta antaŭ ol Franklin forvojaĝis.

Dum alia ekspedicio oni trovis glitveturilon forlasitan, sur kiu staris la metalujo kiu estis malfermata ĉi tiun semajnon. Oni konjektis, ke putra estas la stato de la bovaĵo post la daŭro de tiom da jaroj. Kiam la metalujo estis malfermita, la enhavo troviĝis tute sen ia ŝimaĵo. Estis ankoraŭ bona kaj freŝa, bone pakita kaj ŝajne manĝebla. Kelkaj ratoj, manĝinte iom de la bovaĵo, neniel malsaniĝis.

El « Liverpool Weekly Post » (Semajna Poŝto de Liverpool) *tradukis, 3122.*

★

(1) Sibiria arbardensejo. *(Trad.)*

(2) Tio ĉi ne estas klara; ĉu la aŭtoro ne volas diri, ke la urbo estas ĉirkaŭita de ligna remparo? — *Red.*

Akvo el aero.

Kapitano Rene Fonck kaj liaj kunuloj flugantaj nuntempe trans la Atlantika Oceano portas kun si « viv-savantajn akvo-tasojn ». Ĉi-tasoj estas kaskoj kun speciala naz-aparato, pezantaj 6 uncojn (unco = proks. 30 gram.). Dum spiras la portanto, akvo formiĝas kaj eniras malgrandan ujon. Oni pretendas, ke ĉi-maniere oni povas fabriki sufiĉan akvon por senfine kvietigi soifon.

Tradukita el « The Daily Herald »
(La Taga Heroldo).



El Sibirio.

Apud la urbo Tomsk ekzistas riĉaj karbminejoj Anĵer-Suĝa, kiuj en la jaro 1924 produktis 37.000 tunojn da karbo. Nun ili produktas 60.000 tunojn pojare, kio egalas 128 % de l' supozita kvanto. La sukceso ebligis relaborigi 1500 laboristojn, kiuj en la jaro 1924 estis maldungataj.

Inter la urboj Vladivostok kaj Ĥabarovsk en ekstrema oriento ekzistas fervojo 750 kilometrojn longa. Ĝi vojas laŭ bordo de rivero Ussuri (kiu fluas en riveron Amur) kaj priservas regionon, kiu nun havas ĉirkaŭ 200.000 loĝantojn. Ekonomia vivo de l' regiono rimarkinde kreskas. Dum la ĵus pasinta jaro la vojo transportis 2.500.000 tunojn da varoj, por 15 % pli multe, ol en antaŭa jaro.

Haveno de Vladivostok funkcios dum tuta vintro. La ŝipiradon helpos specialaj glacirompantaj ŝipoj.

M. Krjukov.



Iom da fantazio.

La usona Revuo : « Arto kaj Scienco » publikigis antaŭ nelonge intervjuon de profesoro Kuakuata el la planedo Marso. Jen elkopio de la diroj de tiu marsa scienculo :

« La Tero malfruas rilate nian planedon je 200.000 jaroj, kaj ĝia civilizacio estas ankoraŭ junaĝa. Ni scias pri ĉio, kio okazis sur tiu mizera planedo, depost la apero de l' unua homo, dank' al nia elektra teleskopo, provizumita je aŭdilo. Tiu aparato ebligas al ni vidi kaj aŭdi tion, kio okazas ĉe la plej malproksimaj lokoj el la Universo. Via kompatinda civilizacio datumas nur je kvindek jarcentoj. Vi apenaŭ eliris el kanibaleco, kaj mi eĉ timas, ke kelkaj teraj gentoj ne ankoraŭ forlasis tiun barbaran kutimon. Niaj lastaj observoj rajtigas nin diri, ke via socia sistemo estas ege bedaŭrinda. Koncerne nin, jen 98.000 jaroj, kiam ni forigis la parlamentojn, kie oratoroj senfine kriaĉe protestadis. Marso jam delonge konsistigas universalan respublikon, unu solan landon, kun unu sola lingvo. »

La profesoro ne diras, ĉu tiu lingvo estas esperanto. Sed eble la usona intervjuanto lasas kredi al la legantoj de « Arto kaj Scienco », ke la marsanoj memkompreneble povis nur alpreni la anglan lingvon — iom perfektigitan, por ebligi al ĉiu marsana buŝo ties pronuncon !...

NI FORĜU JUBILEO-ĈENON

K-do HALTER (Bruxelles) donacas 10 frankojn kaj alvokas al K-doj Van Aelst, Ŝerman, Glineur, Bergiers (Bruxelles), Ŝpiro Jozef (Paris), Klopman Samuel (Genève) kaj al K-dino Schapiro (La Chaux-de-Fonds), ke ili same helpu en la forĝado de fortika, nerompebla Jubileo-ĉeno...



NIA MORALO

Moralo — studo aŭ scienco — de l' bono, de l' devo kaj de l' devoj, povas esti la ekskluziva ellaboraĵo nek de la Socio nek de la individuo ; sed ĝi devas esti, kaj ĝi ĉiam estis, ilia komuna ellaboraĵo ; samtempe, ĝi ĉiam estis la rezulto de la socialaj tradicioj kaj de la individuaj eksperimentoj kaj longaj pripensoj.

Vivo naskiĝas el vivo ; la vivo morala de ĉiu homo naskiĝas el la vivo morala de siaj antaŭuloj. Ekzistas tradicio, sinsekvo de moralaj necesaĵoj, kiu tra la longaj homarepokoj, komunikiĝas de konscienco al konscienco. Estus vere stulte, nei ĉian valoron al la moralaj eksperimentoj de l' antaŭaj generacioj ; samkiel estus stultaĵo, rifuzi elĉerpi el la tradicioj. La homo ne pli kapablas krei sola sian moralon, sola sian geometrion aŭ sian fizikosciencon.

Sed, tuj post kiam la individua racio konscias pri si mem, tiam ĝi devas limigi la parton allasendan al la tradicio — aŭ al la tradicioj, ofte sin kontraŭantaj — de la sociala rondo.

Historio elokvente montras, ke la plej notindaj moralaj plibonigoj konsistis en tio, ke la homoj ĉesis kredi je teorioj ĝis tiam preskaŭ unuanime akceptataj. Buddha, Konfucio, Sokrato, Jesuo kaj liaj disĉiploj, Luther, J.-J. Rousseau (Ruso), Tolstoj, J. Jaurès (Ĵores) — unuvorte ĉiuj primoralaj revoluciuloj — eligis el la spiritmalvastaj tradicioj de la sociala rondo, iun larĝan idealon, laŭ ili humana, valida por ĉiuj homoj de ĉiuj socioj kaj de ĉiuj epokoj.

Samkiel tiuj altpensuloj, la plej modesta el la honestuloj juĝas, per siaj personaj eksperimentoj, la tradiciajn moralajn ideojn ricevitaj de la Socio.



La nuntempa revoluciulo — socialisto aŭ komunisto — devas ankaŭ obei tiun leĝon de l' evoluado morala.

Lia justa, necesa malŝatego pri la nuntempa socio kaj ankaŭ pri la antaŭaj, tute ne devas instigi lin nei la altajn moralajn ideojn, kiujn la pasintaj civilizacioj kreis dank' al siaj kolektivaj eksperimentoj. Li ne devas pli forigi tiujn moralajn verojn, ol li devas rifuzi akcepti la sciencajn verojn elpensitaj en la pasinto ; samkiel, ankaŭ, li ne devas rifuzi ŝati la belecon de la artaĵoj postlasitaj de niaj antaŭuloj.

Ekskluzive pli-malpli tradician moralan idealon, restas por gvidi la agadon nur egoismo : la deprapatra egoismo de l' homa besto. Sed egoismo ne estas bona rimedo por konservi en si mem kaj por propagandi la revoluciajn kredon, esperon kaj volon. La atentigo pri persona profito estas eble necesa, sed nesufiĉa. Pro persona profito, klarvida homo ne kapablas eniri la sufer- kaj ofer-plenan vivon de revoluciulo. La homo, kiu nur pro egoismo fariĝis revoluciulo, se poste estos eble, volonte perfidos la Revolucion.

La Revolucio tute ne estas fino en si mem ; ĝi estas nur rimedo ; rimedo havigi al ĉiuj bonstaton kaj liberan tempon, eblecon altiĝi ĝis la plej perfektaj homarkulturoj, kaj finfine, ĝi celas kiel eble plej larĝan disvolviĝon de l'homarsento en la simpla homo.

Por fariĝi bona revoluciulo, necesas subigi sian personan profiton al la profitoj de la tuta homaro ; necesas ankaŭ ami la homaron pli ol sin mem. La proleto devas ami sian sociklason, ne pro tio, ke ĝi estas *lia* klaso ; sed pro tio, ke ĝi estas la plej bonega revolucia klaso, la klaso savonta la homaron.

Do, la revoluciulo devas unue, konservi el la malnovaj moralprincipoj kion la filozofoj nomas ilian *formon*, t. e. la modlilon en kiu estas fandataj la diversaj devoj, la ideon pri ekzisto de devoj, bonoj, malbonoj.

La devo de la proleto rilate sian klason, samkiel la devo de la homo rilate la homaron — tiuj du similaj devoj necesigas la devon ĝenerale. Revoluciulo tute ne estas *senmoralulo.*

Revoluciulo devas ankaŭ en tio, kion la filozofoj nomas la materion de la moraleco, en la tuto de la devoj difinitaj per siaepoka socio revizadi la valoraĵojn.

Li devas forigi la antaŭjuĝojn, kiujn la pastroj, kapitalistoj kaj ŝtatgvidantoj, starigis por daŭrigi sian senliman regadon ; sed tamen li devas fervore konservi la altajn tradiciajn ideojn, hereditaj de la plej geniaj homoj el ĉiuj epokoj.

Ekzemple, li rifuzos kredi je la asketaj antaŭjuĝoj, ke la doloro superas la plezuron, ke la vivo devas esti daŭra pripenso pri la morto. Li rifuzos kredi la naciistajn antaŭjuĝojn, kiuj celas starigi la patrion super ĉion, pravigi la malŝategon kaj malamon por la alilanduloj, kaj glorigi la militon. Li rifuzos kredi la kapitalismajn antaŭjuĝojn, celantaj pravigi la nunan regadon de la kapitalo super la laboro ; kaj ankaŭ, li rifuzos kredi, ke ĉiuj homoj estas tutliberaj kaj samrajtaj, pro tio, ke ili ĉiuj posedas balotrajton, en niaj pseŭdo-demokratioj, en niaj plutokratiaj demokratioj.

Sed li konservos la ĉefajn punktojn de la moralo elpensita de l' antaŭa homaro : la ideon, ke la homo devas esti sinregema, sobra, pura, pensema, inda, modesta, kuraĝa ; la ideon ke la homo devas ami sian familion, ne malamante pro tio la aliajn familiojn ; ke provi ĝi devas realigi, en la familio, idealon farata el fidela amo, ĉiamaganta sindonemo kaj serena kontenteco ; la ideon, ke la homo devas ami ĉiujn homojn, ami ilin kiel sin mem ; kaj esti, rilate ĉiujn, justa kaj bonintenca, sincera, afabla, kaj pardonema ; kaj ankaŭ la ideon, ke li devas ami la homaron, voli la unuecon de la homa gento, kaj ami la universalan vivon.

Apogate sur tiu humana moralo, la socialisto-komunisto povas, devas pravigi sian revolucian idealon. Tiun moralon li provu, klopodu transdoni al la infanoj instruataj de li.

El tiuj prinoipoj, libera spirito povos facile eligi la necesajn revoluciajn konsekvencojn.

Félicien Challaye (Felisjen Ŝalej).

Elfrancigis F. ŜAMAR.

El « L'Internationale de l'Enseignement »
(La Internacio de l' Instruado).

La proletoj esperantistoj povas profiti sian esperantoscion nur se ili estas anoj de

☆ SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA ☆

Fondita en la jaro 1921

Asocia sidejo: **SAT, 23, Rue Boyer,** PARIS-XXe (Francio)
Administrejo: **SAT, Colmstrasse 1,** LEIPZIG-O-27 (Germanio)



Per sia aneco ili havas je sia dispono aparaton, kiu ebligas al ili la praktikan utiligadon de esperanto laŭ tutmonda skalo

Kio estas SAT?

SAT estas organizo, celanta *utiligi esperanton por la servo de l' proletaro tutmonda.*

SAT celas emancipi la manlaboristojn je la gviduzurpemo de la poliglotaj intelekt-uloj, kiuj *fakte* estas la solaj perantaj agentoj inter la diverslandaj proletoj.

SAT *ne estas politika, sed nura kulturorganizo,* klopodanta eduki kaj klerigi siajn membrojn en *sennacieca* spirito.

SAT devigas siajn membrojn laŭstatute ne nur servi al la tutmonda laborista movado, sed ankaŭ doni helpon kaj konsilojn al vojaĝantaj membroj.

SAT plenumas tiujn taskojn per la eldono de 3 gazetoj:

1) **Sennaciulo**, semajna, 8-12 paĝoj, formato 25 × 32 cm.
2) **Sennacieca Revuo**, monata, 20-24 paĝoj, formato 15 × 23 cm.
3) **La Lernanto**, monata, 4 paĝoj, formato 16 × 25 cm.

kaj de

4) **Jarlibro**, kiu entenas la adreson de ĉiuj membroj de SAT, statuton, oficialajn kaj praktikajn informojn, enciklopedian parton, ktp....
5) **Biblioteko** el valoraj verkoj (vidu ties liston sur apuda paĝo).

Aliĝoj al SAT

La membreco dividiĝas dufake: *aktiva* membro kaj *pasiva* membro. Ĉiu *aktiva* membro rajtas: a) voĉdoni senpere en la ĉiujara kongreso de SAT; b) partopreni ĉe ĉiu ĝenerala voĉdono de la Asocio; c) ricevi membrokarton, jarlibron kaj uzi aliajn ĝeneralajn servojn de la Asocio. — Ĉiu *pasiva* membro (persono, grupo, organizo, sindikato, kooperativo, partio, ktp.) ricevas la jarlibron, membrokarton kaj povas uzi la ĝeneralajn servojn de la Asocio, sed ne rajtas partopreni ian voĉdonon, nek eniĝi ian organon asocian.

Kotizo al SAT

(la plej malkara kompare kun ĉiuj ajn kotizoj al esp. organizoj)

La unuaj nombroj kiuj ĵus sekvas la landnomon indikas la jarkotizon (sen abono) por *Membro Aktiva* kaj *Membro Pasiva,* — la nombroj inter krampoj indikas la minimuman jarkotizon por *Grupo, Organizo, Sindikato,* ktp.

Argentino **1,50** pes. (**3**); Aŭstrio **2** ŝil. (**4**); Belgio **8** fr. b. (**16**); Brazilio **3** milr. (**6**); Britio **2** ŝil. (**4**); Bulgario **50** lev. (**100**); Ĉekoslovakio **10** kr. (**20**); Danio **2** kr. (**4**); Estonio **150** mk. (**300**); Finnlando **15** mk. (**30**); Francio **8** fr. fr. (**16**); Germanio **1,50** mk. (**3**); Hispanio **3** pes. (**6**); Hungario **25.000** kr. (**50.000** kr.); Italio **10** lir. (**20**); Japanio **1** jen (**2**); Jugoslavio **25** din. (**50**); Latvio **2** lat. (**4**); Litovio **4** lid. (**8**); Nederlando **1** guld. (**2**); Norvegio **2** kr. (**4**); Polio **3** zl. (**6**); Portugalio **8** esk. (**16**); Rumanio **50** lej (**100**); Sovet-Unio **0,75** rubl. (**1,50**); Svedio **2** kr. (**4**); Svisio **2** fr. sv. (**4**); Usono **0,70** dol. (**1,50**); (el pluraj SAT-anoj samfamiliaj, nur unu pagas plenan kotizon, la ceteraj duonan kotizon: sed ni liveras nur 1 jarlibron por la familio).

Aliĝilon kaj monon sendu al

Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero.

La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto No 6835.

SENNACIULO

LA UNUA SEMAJNA GAZETO LABORISTA
EN ESPERANTO

Fondita en 1924

RAPORTOJ, INFORMOJ PRI VIVO KAJ BATALOJ DE LA LABORISTARO TRA LA MONDO. TRIBUNO POR DEBATO PRI ĈIUJ SOCIAJ PROBLEMOJ. DIVERSAJ RUBRIKOJ : RADIO, FEMINISMO, SCIENCO, TEKNIKO, VEGETARISMO, TRA ESPERANTIO, « INTER NI », KTP.... ILUSTRITA, BELASPEKTA KAJ BONE REDAKTATA EN TUTE ZAMENHOFA STILO.

Redaktejo : **14, Avenue de Corbéra,** PARIS-XII[e] (Francio)
Administrejo : **Colmstrasse 1,** LEIPZIG-O-27 (Germanio)



Nova tarifo de jarabono al « Sennaciulo »
valida de oktobro 1926

Ĉiu abonanto ricevas senpage « LA LERNANTO »-n

(La nombroj kiuj ĵus sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj montras la abonprezon por ne-membroj).

Argentino **4,50** pes. (**5**); Aŭstrio **8** ŝil. (**10**); Belgio **30** fr. b. (**35**); Brazilio **10** milr. (**12**); Britio **7** ŝil. (**8**); Bulgario **180** lev. (**200**); Ĉekoslovakio **45** kr. (**50**); Danio **7** kr. (**8**); Estonio **550** mk. (**600**); Finnlando **60** mk. (**65**); Francio **30** fr. fr. (**35**); Germanio **6** mk. (**7**); Hispanio **9** pes. (**10**); Hungario **80.000** kr. (**100.000**); Italio **35** lir. (**40**); Japanio **3,50** jen (**4**); Jugoslavio **90** din. (**100**); Latvio **7** lat. (**8**); Litovio **13** lid. (**15**); Nederlando **4** guld. (**5**); Norvegio **7** kr. (**8**); Polio **8** zl. (**10**); Portugalio **30** esk. (**35**); Rumanio **250** lej (**300**); Sovet-Unio **3,50** rubl. (**4**); Svedio **6** kr. (**7**); Svisio **8** fr. sv. (**9**); Usono **1,80** dol. (**2**).

Ankaŭ duon- kaj kvaron-jare abonebla. Po ekzemplera prezo : **0,20** mk. g.

Mendu provekzempleron ĉe Administracio de SAT

Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27, Germanio

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero.

La germanianoj pagu al la poŝtĉeka konto de la Administranto N° 6835.

La abonoj validas nur post pago kaj povas komenciĝi kun ĉiu numero.

I. — Nia donaco al ĉiu nova abonanto de « Sennaciulo »

Donaco A : kiu abonas por *ses monatoj,* tiu ricevas **senpage** 1 ekz. de la broŝuro *Parlamentisma Iluzio* (12 p. 10 × 16 cm.) kaj rajtas je unu enpreso de korespondo-peto.

Donaco B : kiu abonas por *unu jaro,* tiu ricevas **senpage** la broŝurojn *Parlamentisma Iluzio* kaj *Krimoj de Dio* (32 p. 10,5 × 17) kaj rajtas je unu enpreso en korespondo-peto.

II. — Niaj premioj al varbabonantoj

Premio A : kiu varbos **1** *novan jarabonon* al « Sennaciulo » ĝis 1. Marto 1927, tiu ricevos **senpage** 1 ekz. de la broŝuro *La Krimoj de Dio.*

Premio B : kiu varbos **2** *novajn jarabonojn,* tiu ricevos **senpage** la premion A + la broŝuron *La Parlamentisma Iluzio.*

Premio C : kiu varbos **4** *novajn jarabonojn,* tiu ricevos **senpage** la premion B + 1 ekz. de *Fundamento de Esperanto* (184 p.)

Premio Ĉ : kiu varbos **6** *novajn jarabonojn,* tiu ricevos **senpage** la premion C + 1 SAT-libron elektotan elinter tiuj signitaj per ☆ (vidu ties liston sur apuda paĝo).

Premio D : kiu varbos **10** *novajn jarabonojn,* tiu ricevos **senpage** 1 SAT-libron signitan per ☆☆ + jarkolekton 1924-25 de « Sennacieca Revuo ».

Premio E : kiu varbos **15** *novajn jarabonojn,* tiu ricevos **senpage** 1 SAT-libron ☆☆ + 1 SAT-libron ☆☆☆ + jarkolekton 1924-25 de « Sennacieca Revuo ».

Tarifo por anoncoj

Grandaj anoncoj : unu enpreso po kvadrat-centimetro kostas **0,12** mk. g.
Korespondanoncoj : unu enpreso, simpla, trilinia anonco kostas **0,50** mk. g.
Anoncoj en jarlibro : la prezoj estas la duoblaj de tiuj por « Sennaciulo ».

SENNACIECA REVUO

LITERATURO - SCIENCO - PEDAGOGIO

MONATA ORGANO

Fondita en 1919

MONATA REVUO ILUSTRITA, BELASPEKTA, BONSTILA. ENHAVAS PLEJ BONAJN FRAGMENTOJN DE MODERNA PROLET-MONDLITERATURO; SCIENC-TEKNIKAJN ARTIKOLOJN PRI STATO KAJ PROGRESO DE SCIENCOJ; SKIZOJN PRI SPERTOJ KAJ METODOJ DE PROLET-EDUKADO KAJ PEDAGOGIO, KTP.

Redaktejo: **1-a Tverskaja-Jamskaja 35 kv. 5,** MOSKVO I (U.S.S.R.)
Administrejo: **Colmstrasse 1,** LEIPZIG - O - 27 (Germanio)



Nova tarifo de jarabono al « Sennacieca Revuo »
valida de oktobro 1926

(La unuaj nombroj, kiuj ĵus sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj la abonprezon por nemembroj.)

Argentino **2** pes. (**2,50**); Aŭstrio **4** ŝil. (**5**); Belgio **13** fr. b. (**15**); Brazilio **4** milr. (**5**); Britio **3** ŝil. (**4**); Bulgario **80** lev. (**100**); Ĉekoslovakio **20** kr. (**25**); Danio **2,50** kr. (**3**); Estonio **250** mk. (**300**) Finnlando **25** mk. (**30**); Francio **13** fr. fr. (**15**); Germanio **2,50** mk. (**3**); Hispanio **4** pes. (**5**); Hungario **40.000** kr. (**50.000**); Italio **15** lir. (**20**); Japanio **1,50** jen (**2**); Jugoslavio **40** din. (**45**); Latvio **3** lat. (**3,50**); Litovio **6** lid. (**7**); Nederlando **1,50** guld. (**2**); Norvegio **3** kr. (**4**); Polia **3** zl. (**4**); Portugalio **12** esk. (**15**); Rumanio **120** lej (**150**); Sovet-Unio **1,25** rubl. (**1,50**); Svedio **2,50** kr. (**3**); Svisio **3,50** fr. sv. (**4**); Usono **1** dol. (**1,25**).

Ankaŭ duon- kaj kvaron-jare abonebla. Poekzemplera prezo: **0,30** mk. g.

Mendu provekzempleron ĉe Administracio de SAT

Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27, Germanio

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero.

La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto № 6835.

La abono validas nur post pago kaj komenciĝas kun ĉiu jarkvarono.



☆ LA LERNANTO ☆

FACILLEGEBLA — INSTRUA — AMUZA — ŜERCA

Respondas al la lingvaj demandoj de legantoj.

Nepre necesa por ĉiu, kiu deziras funde lerni la lingvon.

Specialaj aĉet- kaj abon-kondiĉoj.



Oni petu informojn al la Administracio de SAT.

Eldonkooperativo de SAT

estas entrepreno, kiu celas al produktado de valoraj kaj gravaj verkoj (originaloj kaj tradukoj). Ĝis nun aperis 25 libroj (ĉi-sube vidu ties liston).
Oni povas ricevi profiton, helpante al la kreskado de nia Kooperativo, per aĉeto de

Akcioj !

Ĉiu akcio valoras *1 usonan dolaron* kaj liveras al la posedanto renton je 10 %.
Ekzistas ankaŭ duondolaraj akcioj.
Tiujn akciojn ni akceptas kiel pagon de niaj libroj.
(Pliajn informojn oni petu al SAT-Administracio.)

Kolekto de SAT-verkoj

Kiu volas perfektiĝi en la scio de esperanto kaj akiri konojn pri sennaciismo, tiu nepre legu la librojn eldonitajn de SAT.

		Nova prezaro en mk. g.
☆☆	**Ni Legu!** Brunulo. (Internacia Legolibro), originalo (3-a eld.) 112 p. 12 × 17	1. —
☆	**Nur Volu!** Izgur, originalo (2-a eldono) 16 p. 14 × 21	0.35
☆☆	**Faŭsto,** Gœthe (trad. N. Barthelmess) 156 p. 11 × 17	1.20
☆	**Eklumo en Abismo,** H. Barbusse, 96 p. 11 × 17	0.80
☆	**La Komunista Manifesto** (2-a eldono) 48 p. 11 × 16	0.60
☆☆	**Dokumentoj de Komunismo,** 132 p. 11 × 17	1. —
☆	**ABC de Sennaciismo,** V. Elsudo, originalo, 60 p. 11 × 18 (2-a eldono baldaŭ aperos)	0.50
☆	**For la Neŭtralismon!** E. Lanty, originalo (2-a eldono) 24 p. 11 × 18	0.25
☆	**El la Mondbildo de l' Nova Fiziko,** D-ro Reiche, 52 p. 11 × 17	0.60
☆☆	**Malgranda Terbiblio** (Prolet. Atlaso), Szeréni, originalo, 31 kartoj kaj skemoj, 25 × 36	1.80
☆☆☆	**Proletaria Kantaro** (74 kantoj kun muziknotoj) 180 p. 11 × 17	2.50
☆	**Petro** (kursa lernolibro laŭ parola metodo) 64 p. 12 × 17	0.70
☆	**La Kemio de la Universo,** Prof. Fersman, 80 p. 11 × 14	0.60
☆	**Kontraŭ Dio!** (Ateista Krestomatieto) 28 p. 14 × 22	0.40
☆	**La Morto de Blanjo,** J. Tousseul, 72 p. 11 × 14	0.60
☆	**Tri Verkoj de Tolstoj,** 78 p. 12 × 19	0.80
☆	**Ruĝo kaj Blanko,** L. Jvn, originalo, 68 p. 11 × 14	0.60
☆	**Sekspsikologio,** S. Ziegler, originalo, 54 p. 11 × 14	0.60
☆	**Orienta Blovo,** 28 p. 14 × 22	0.40
☆	**En Katenoj de la Maljusteco** (Virina Krestomatieto) 40 p. 14 × 22	0.60
☆☆☆	**Etiko,** P. Kropotkin, 240 p. 13 × 18	1.80
☆	**Karl Marx — lia Vivo — lia Verko,** 88 p. 11 × 14	0.60
☆☆	**Ŝtato kaj Revolucio,** Lenin, 160 p. 11 × 17	1. —
☆☆☆	**Je la nomo de l' Vivo,** Izgur, originalo, ĉirkaŭ 226 p., en presado: sur bela papero	2. —
	Petro (en « brajla », por blinduloj): en presado.	

Membroj de SAT rajtas dekalkuli 20 % rabaton por siaj propraj ekzempleroj.

Poŝtkarto (kun SAT-propaganda teksto) 100 ekz. **1** mk. g,; 25 ekz. **0,30** mk. + 10 % por afranko.
Poŝtkarto ilustrita por SAT-propagando: baldaŭ aperos.

SAT-insigno

Diametro 18 m/m (pinglo, broĉo, butono): verda stelo sur ruĝa fundo kun SAT-surskribo	0.80
— 12 m/m (nur pinglo) — — — — — — —	0.60
— 12 m/m (nur pinglo) *sen surskribo*	0.60

La ĉi-supraj prezoj de la libroj kaj insignoj entenas la afrankon.
Livero okazas nur kontraŭ antaŭa pago.

Mendon kaj monon sendu al Administracio de SAT

Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig-O-27

Poŝtĉek-konto 6835.

Ni povas liveri esp. librojn de aliaj eldonfirmoj, aparte:

Fundamenta Krestomatio, de D-ro Zamenhof, 460 p.	2.75
Fundamento de Esperanto (fr. angl. germ. rus. pol.) 184 p.	1.25
Lingvaj Respondoj, de D-ro Zamenhof, 92 p.	1.50
Vortaro de Esperanto (esp-o - esp-a) de Kabe, 175 p.	2.50

★ IMP. SOLSONA, 9, RUE HALLÉ, PARIS-XIVᵉ — TÉL. GOBELINS 62-71

TIE ĈI KAJ TIE

Kompatinda lingvo.

Studentoj internacie kongresis antaŭnelonge en Praha. Ili decidis alpreni la francan lingvon kiel oficialan...

★

Kiom malavare.

La sklaveco estis lastatempe forigita en la ŝtato Nepal (Hindio). Multokaze la sklavo-posedantoj ne akceptis kompenson.

Kiam la salajruloj liberigos sin el la ekspluatado, iliaj mastroj ankaŭ ne postulu kompenson.

★

Ĉu kompati, ĉu indigni?

Pacifistoj (proksimune 4.000 el multaj landoj) kongresis, lastan monaton, en Bierville (Bjervil), Francio. Renkontiĝis tie: episkopo, senatano, profesoroj kaj multaj aliaj diversspecaj eminentuloj, inter kiuj decas ne forgesi S-ron Karlo Henri, la reprezentaton de la... franca ministro de milito!

Ne kredu, karaj legantoj, ke tio ĉi estas ŝerco; tute ne, la fakto estas aŭtentika.

Kaj cetere kial miri? Ĉu la ministroj de milito ne havas kiel taskon organizadi la pacon? Si vis pacem, para bellum, *jam de jarmiloj ripetaĉas latine ĉiaj patriotoj.*

Kaj la pacifistoj, kunvenintajn en Bjervil, certe estas bonaj patriotoj.

Ni nur kompatu la laboristojn, kiuj devojiĝis en tian medion.

★

Kiu volas famigi sian nomon?

Tiu sendu sian adreson al: H. Runham Brown (*Ranam Braŭn*), *11, Abbey Road, Enfield, Middlesex, (Anglio). Tiu S-ro estas ankaŭ bona pacifisto, kiu volas atingi sian celon per la forigo de la deviga militservo. Li eldonis en kelkaj lingvoj, inter kiuj esperanto, manifeston per kiu estas klarigata la celo. Jam subskribis la verkajon multaj famuloj: Norman Angell, H. Barbusse, A. Einstein, Rabindranath Tagore, Otto Jespersen ktp., ktp.*

Se la rimedo por forigi la militon ne ŝajnas al vi tre efika, almenaŭ ĝi estas neniel danĝera — kaj kostas nur unu poŝtmarkon...

Al tiu ĉi numero estas aldonita katalogo kun novaj malaltigitaj prezoj de SAT-libroj, abonoj al SENNACIULO *kaj* Sennacieca Revuo.

Kaŭkazaj impresoj

Kaŭkazon oni nomas sanigejo de Rusio.

La naturo plenmane disĵetis ĉi-tie siajn sanigajn trezorojn. Sur tre malgranda spaco ĉi-tie estas koncentrigitaj la plej diversaj, laŭ kemia konsisto, fontoj kaj kurackotoj. Krome la sulfurozaj kaj ferozaj banprocedoj, kaj eĉ la suda suno mem bonefikas sur la malsanan korpon.

Do, jam de la komenco de kuracsezono, homamasoj direktiĝas ĉi-tien el ĉiuj anguletoj de l' vasta Rusio kaj eĉ el eksterlando.

Ĉi-tie oni ĉiam povas renkonti surstrate — jen malgrasan kiel haringon ftizulon, — jen, male, ŝvitriĉan, sufokiĝantan pro troo da graso, dikventrulon, kiu venis ĉi-tien, por... malplidikiĝi. Banurboj abundas ankaŭ je reŭmatismaj, nervemaj kaj intestaj malsanuloj.

La naturo malavare dorlotas ĉiujn. Ĉiuj ĝuas ĝojon de la resaniĝo, aŭ almenaŭ dolĉecon pro la espero.

Ekzistas diversaj kategorioj de malsanuloj ankaŭ laŭ ilia monstato.

La unuaj — ĉu ili ĝuas senpagan kuracadon kaj prizorgadon de la regnaj kuracejoj, — ĉu apenaŭ vegetas per sia propra monrimedo — havas kiel rifuĝejon duondetruitan stalon kaj nutriĝas preskaŭ nur per legomoj kaj pano, ĉar en banurboj ĉio estas pli kara ol ie ajn. — Ili estas laboristoj, vilaĝanoj kaj ĝenerale malriĉaj homoj.

La duaj sukcesas elspezi po 400-500 rubl. (250 dol.!) ĉiumonate. Ili — privatuloj, negocistoj, kaj oficistoj kun flanka laborenspezo, krom altetaksata speciala salajro, — inĝenieroj, advokatoj, doktoroj k. s. Ĉi lastaj aspektas ne malpli «dece» ol la ĝisrevoluciaj riĉuloj, kiuj alveturis ĉi-tien celante nur distriĝon. «Ĉervonci» (dekrublaj monbiletoj) bruetas en la aero kaj la ecojn de la franca firmo Coty (Koti) oni reklamas ne nur per virinaj lipoj, vangoj kaj ŝultroj, sed ankaŭ... per tiuj de viroj!...

Cetere, la regno lerte humiligas ĉi-sentaŭgulojn per speciale starigita por ili takso de porkuracaj servoj kaj objektoj, kelkoble pli granda ol tiu por laboristoj kaj vilaĝanoj.

Laŭ ilia kuracoforto ĉi tieaj mineralaj fontoj dividiĝas je tri partoj. Ĉiun estras aparta urbeto, kiu nomiĝas laŭ karakteriza destingo de la loka naturo: — Pjatigorsk (Kvinmonta), Kislovodsk (Acidfonta) kaj Ĵeleznovodsk (Ferozfonta). Ili estas vere pentrindaj urbetoj, puretaj kaj kvazaŭ enkadrigitaj en la verda freŝeco de ĝardenoj, algluiĝintaj ĉe malsupro de la montoj.

Abundo de artistoj, kiuj venas ĉi-tien ĉiusomere faras la ĉeestadon tre interesa flanke de la kontentigo spiritajn bezonajn. Koncertoj, spektakloj kaj amasaj promenadoj al la vidindaĵoj sekvas unu la alian.

La banurboj ĝuas facilan, senzorgan tempopasigon.

★

En Pjatigorsk troviĝas tri SAT-anoj kaj kelkaj ne jam «satanigitaj» esperantistoj.

K-do 1705 faris viglan propagandadon inter profesiaj unuiĝoj kaj jam sukcesis aranĝi kursojn ĉe la loka poŝtoficejo kaj ĉe profunuiĝo de medicinaj laboristoj.

Nia fervorulo espereble kvinobligos la nombron de SAT-anoj en Pjatigorsk por la sekvonta jarlibro.

Mi pasigis la tempon en la interesa societo de «sataneca» familio, kiu afable akceptis min. Jen efektive modela familio, kie ĉiam regas atmosfero de profunda konscienco kaj nedetruebla konvinko je venko de nia idearo, kie esperanto estas vere viva ligilo kaj kvazaŭ naska lingvo.

Certe ne baldaŭ mi forgeros la kvinjaran Jurĉjon, kiu ĉiam salutas vin esperante kaj petate tuj deklamas al vi «Nova kanto»-n. Mi por longa tempo konservos en la memoro la sonoran voĉeton kiu kum ĉarma kartaveco dum tutaj tagoj kantadis: —

Fero varmiĝas,
Brako leviĝas,
Frapu vi, mi —
Riki-tiki-tu!...

Veturante Leningradon ĉe ni haltis por unu tago Sadijkov Husejno, perso SAT-ano 6358. Ni gaje pasigis ĉi-tagon! Malvarmaj kaj viglaj ondetoj de l' rivero Podkumok, kiuj aŭdis multajn lingvojn kaj dialogojn de la montanoj kaj diversnaciaj malsanuloj, verŝajne estis tre mirigitaj kiam ili ekaŭdis tute novan lingvon de la homoj, kies korpoj ili karesis...

★

Morgaŭ mi veturos Leningradon.

Adiaŭ, Kaŭkazo! Ne, prefere: — Ĝis la revido!...

DM. ALBANOV (1188).

Pjatigorsk, 30/VII-26.

La Internacia Junulara Tago

pasis, antaŭ ol ni sukcesis jam fin-organizi nian Junsekcian interligan laboron. Ĉi-jare do okazis tiu grava internacia aranĝo de l' batalanta junularo tutmonda *sen* organizita nia partopreno. Nur laŭvole kaj laŭhazarde flugis salutoj tien kaj reen.

La Junulara Tago trovis nin dum organiza laboro. Tasko nia estas, atingi. ke venontan jaron, dum la Junulara Tago oni ne plu povu malatenti nin, sed ke ni staru en la mezo de la intereso kaj ĉiuflanka atento, ke ni estu la plej grava faktoro en la internacia interligo, ke nia aparato funkciadu por la servo al milionoj da kuniĝemaj junuloj en tutmonda kadro!

Tio estu nia solena promeso kaj nia manifesto en ĉi-jara Internacia Tago de Junularo!

JUNULAR-SEKCIO ĈE SAT.

Sept. 1926.

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

La « Fundamento de Esperanto » (1) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta *kontrolilo,* kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.

L.-L. ZAMENHOF.

(1) Mendebla ĉe nia Administrejo.

Sennaciula Radio-Paĝo

Nia Programo

Kun multe da bedaŭroj, la radio-amatoroj konstatis la malaperon de nia radio-rubriko.

Tiu fakto okazis pro la nesufiĉo da informoj. — SENNACIULO *ja ne estas ligita kun la grandaj inform-firmoj* (Havas, Rosta, Radio, ktp.); *ni do bezonas la helpon de niaj legantoj.*

Ĉiuj povas esti kunlaborantoj niaj. Ju pli ni ricevos da informoj, des pli ni povos elekti la plej taŭgajn el ili kaj publikigi vere interesan paĝon. Ĉiuj, kiuj povas, helpi nin devas.

Fakte, nia tasko estas grava, kaj tre rapide pli kaj pli graviĝos. Radio kaj esperanto estas ĝemelfratoj. Radio rapide disvastiĝis tra la mondo, ĉar jam de l' komenco de la unuaj disaŭdigoj, ĉiuj popoloj komprenis tiun belan internacian lingvon la Muzikon. *Sed por la informoj, kursoj, kantoj, paroladoj, ankoraŭ mankas interkomprenigilo. Nur esperanto taŭgas por tiu celo.*

Ni devas atenti pri tiu grava fakto: la ebla malapero de ĉiuj gazetoj, eĉ de SENNACIULO.

Dank' al mallongaj ondoj, oni jam povas transiri Atlantikon per sendaparato simpla, ne tro multekosta kaj malforta (2 watoj sufiĉas). *Ni povas esperi, ke, eble antaŭ 10 jaroj,* SENNACIULO *estos anstataŭita de SAT-sendstacio. Tiamaniere, niaj legantoj ne plu ricevus sian gazeton ĉiusemajne, sed aŭdus ĝin ĉiuvespere.*

Estas pro tio ke devas interesiĝi pri nia fako, ne nur la radio-amatoroj, sed ĉiuj SAT-anoj.

Resume, ni bezonas informojn pri esperantaj disaŭdigoj kaj kursoj, pri starigo aŭ agado de Lab. Radio-Kluboj, pri decidoj de Radio-Kluboj rilate esperanton, pri utileco kaj uzado de radio por klasbatalo, pri projekto de Radio SAT fako, ktp.; la temoj ne mankas!

SENNACIULO *ne estas teknika revuo. Tamen kiam ni povos priskribi simplajn aŭ novajn ricevaparatojn, per skemoj, per praktikaj konsiloj, ni faros ĝin.*

Tia estas nia programo. Kun la helpo de ĉiuj ni esperas kontentige ĝin plenumadi.

H. NICOLLET (Lyon).


SUPERGALENO

Jen por la galenanoj, ricevaparato, kiu taŭgas por ĉiuj bezonoj. Unuavide ĝi ŝajnas malsimpla, tamen ĝi estas facile muntebla.

Ĝi estas Tesla'o kun cirkvito por forigi la netaŭgajn aŭdajojn. Dank' al du inversiloj kaj tri manturniloj, pli ol dek kombinoj estas eblaj.

La manturnilo M 1 ebligas agordi aŭ ne, la unuan cirkviton; forigi la unuan kondensatoron, kaj rekte kunigi la antenon kun la tero.

La inversilo I 1 taŭgas por ricevo laŭvole, ĉu grandajn ĉu malgrandajn ondojn (kondensatoro paralele aŭ serie).



La inversilo I 2 ebligas aŭdi laŭ la Oudin'a metodo, forigante unu el la du mielĉelaj bobenoj B 1 aŭ B 2, kaj la lastan kondensatoron pere de la manturnilo M 2.

Per la manturnilo M 3 oni povas elekti taŭgan punkton sur la unua galeno, poste sur la dua, fine aŭdi per la du detektoroj.

B 3 estas la cirkvito por forigi atmosferaĵojn.

Oni povas konkludi, ke estas multaj diversaj ricevaparatoj nur en unu.

(771).

LA TELEVIDEBLECO

La scienculo Belin kaj diversaj angloj, germanoj kaj usonanoj jam finis la antaŭstudojn pri televidebleco. Ili komencis apliki la radiotelegrafan transsendon de la bildoj. Ĝi nune funkcias kaj baldaŭ komerce funkcios inter Londono kaj Nju-Jorko. — La usona polico jam ĝin uzas por transsendi al ĉiuj policistoj de l' mondo la slipojn de la juĝotoj serĉataj de ĝi.

Sed S-ro Belin daŭrigis perfektigi la novan eltrovaĵon. Li sukcesis la televideblecon, t. e. la malproksiman videblecon de personoj aŭ objektoj starantaj antaŭ la sendaparato per personoj havantaj ricevaparaton.

(771).

PAŜOJ ANTAŬEN

La laborista federacio de Ĉikago sukcesis akiri radio-sendstacion, antaŭe uzitan de la ŝtatmaristaro. La instalaĵoj, kiuj staras en domego lokita sur la ĉirkaŭaĵo de la Ĉikaga varfo (1), estos aranĝitaj kiel granda sendstacio. Ĝia tasko estos kontraŭagi la kontraŭsindikatan propagandon kaj disvastigi la informojn interesajn por la laboristoj.

La ĉikaga unuiĝo de l' tipografistoj jam metis 10.000 dolarojn je la dispono de la stacio. Plie, la lab. ĉikaga federacio baldaŭ pagigos dudolaran kotizon al ĉiuj sindikatanoj. La duono de tiu kotizo estos elspezata por aĉeti kaj plibonigi la stacion, alia duono estos ekspluatata kapitalo. La graveco por la laboristoj posedi radio-sendstaciojn, estis elmontrita dum la ĝenerala angla striko, kiam la registaro havis eblecon disaŭdigi per radio la oficialajn sciigojn al la loĝantaro.

En Holando, ekzistas laborista asocio de radio. Tiu-ĉi luas la nacian sendstacion unu vesperon ĉiusemajne kaj tiele povas rekte kontaktiĝi kun la publiko.

Tiu asocio uzis de tiu povebleco por sendi sciigojn france, angle kaj germane laŭ informoj de la F. S. I., de la I. T. F., ktp., pri la stato de la angla striko kaj ĉefe pri la aranĝoj deciditaj kaj preparitaj sur la kontinento por helpi la anglajn K-dojn.

La anglaj laboristoj erarigitaj de la kapitalistaro, estis informitaj pri veraĵoj, kio helpis al plifortigo de la malcedemo.

H. N.

PRAKTIKAJ KONSILOJ

Antaŭ munti malsimplajn ricevaparatojn, provu la valvan reakcidetektoron.

★

Provu ŝanĝi la lokon de viaj valvoj. Bona detektorvalvo povas esti malbona amplifilvalvo.

(771).

(1) Havena digo.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

Aŭstrio.

Wien. — La aŭstria SAT-anaro fondis gazetservon, kies celo estas : priservi SENNACIULO-n per artikoloj pri la aŭstria lab. mov. k. aliflanke priservi la aŭstrian prol. gazetaron per artikoloj pri la lab. mov. en la tuta mondo. Prizorgas la servon K-doj Batta, Kostka, Slezak k. Fitta. Ĉiuj SAT-anoj estas petataj aktive subteni nin. — *Aŭstria-Proletara-Gazetservo.* Laborista domo, Wien XXI, Angererstr., 14.

Germanio.

Zittaŭ. — La 21 k. 22 aŭg. okazis en nia urbo kunveno de lab. esp-istoj aranĝita de la grupa « Nova Tempo ». Ĉeestis Gek-doj el Dresdeno, Görlitz, Gablonz (Ĉeĥosl.) kaj multaj el Zittaŭ k. ĉirkaŭaĵo. La grupestro K-do Dittmann gvidis la debatojn. Estis decidite fondi LEA-distrikton. Preskaŭ ĉiuj parolintoj esprimis, ke ĉiu SAT-ano devas esti ano de sia landorganizo k. ĉiu landorganizano scipovanta esp-on devas esti SAT-ano. Estis parolate pri la gramatika k. la rekta instrumetodoj. Dimanĉe matene oni ekskursis sur la montaron ; tie raportis K-do Köckeritz (Dresdeno) pri la lasta « asocia tago » (LEA). — *SAT-ano 4242.*

Latvio.

Riga. — La 17, 29 jul. k. 5 aŭg. okazis ĉi tie unuafoje perradiaj paroladoj pri esp-o. La lasta parolado estis dediĉita al ĝen. movado entute kaj al tiu de SAT. aparte. Parolinto nia K-do A. Krastin (3684).

Litovio.

Anykŝĉiai. — La 15 julio estis starigataj kursoj de esp-o. Instruas SAT-ano Malaŝauskas, loka poŝtoficisto, socialdemokrato. La estro de tiu ĉi poŝtoficejo estas klerikalulo kaj al li, tiu esp. instruado tute ne plaĉis. Por ke al nia K-do estu pli malfacila lia tasko, la estro ŝanĝis lian labortempon, tiel ke li devas labori ĝis la 21-a h. Je tia malferma horo estas ja malfacile instruadi. Malgraŭ tio nia K-do daŭrigas senlace sian laboron por nia afero.

6089.

Ŝiaŭliai. — La ĉi tieaj geesp-istoj dum la terkultura kaj industr. ekspozicio de tuta Litovio (22-26-VIII) aranĝis esperantlingvan ekspozicieton kaj por tio ricevis arĝentan medalon.

E. M.



Ĉe la neŭtraluloj.

Laŭ « Heroldo de Esperanto », aliĝis al la XVIII-a Universala Kongreso de Esperanto, 960 personoj el 39 landoj. Kiom partoprenis ? Ne estas pri tio sciigite. Kompense la raportinto bombaste skribadis pri la koncertoj, balo k. a. amuzaĵoj per kiuj estis plenigata la programo.

Estas tamen interese noti, ke iu cionista patrioto, d-ro Olsvanger, kritikis severe la esperantistaron. Li diris interalie, ke la « interna ideo » ne devas esti « ia mistifikaĵo, mieldolĉa sentimentaleco, ke necesas doni al ĝi filozofian formon... » Sendube li tenas tute preta por tio sian mesian kredon je la dispono de la « samideanoj ».

La XIX-a kongreso okazos en Danzig.



Ni jam raportis, ke nun la tuta biblio estas eldonita en esp-o. Sed oni diras, ke la katolikaj esperantistoj ne konsentas la tradukon, kiu ja estas farita parte de judo (Zamenhof) kaj de protestantoj.

Kial do la kristana dio ne konsentas akordigi tiujn kredulojn ? Vere ĝi estas strangulo ; kaj verŝajne ŝatas vidadi la nemalpli strangajn kredulojn, interdisputadi dum jarcentoj pri la signifo de kelkaj vortoj.



Antaŭ nelonge malfermiĝis en Tokio kafejo nomata « La Verda Stelo ». La menuo estas presita en esp-o. La mastro klopodas por ke la kelnerinoj scipovu la lingvon. La esperantistaj gastoj estas invitataj skribi sian nomon en speciale aranĝita por tio kajeron.

(Laŭ « Juna Azio »).



Tio ĉi ne estas ŝerco...

« Mi anoncas... ke la nuna mondo devus perei, se la Sankta Sinjoro Deguĉi ne aperus, kaj ne prenus al si la gravan taskon de l' mondsavado... »

Tio ĉi estas aŭtentika teksto el esperantlingva propagandilo larĝe kaj *senpage* disvastigata en la tuta mondo per la t. n. Oomoto Propaganda Oficejo. (Kameoka, kiotofu, Japanio).

Kia bonŝanco !... Ni danku al la sanktulo, kiu tiel bonkore sin dediĉas al nia savado — kaj samtempe tre lerte kaj malmodeste sin mondfamigas per fotoj kaj rakontoj vere diecaj, t. e. vortecaj, senhavecaj.

Ĵus aperis :

ETIKO

de P. KROPOTKIN

240 paĝoj. — Prezo : **1.80** mk. g. inkluzive afranko

ENHAVO

Portreto de l' aŭtoro. — Antaŭparolo de Prof. N. Kabanov. — Ĉapitro I. La moderna bezono konstrui fundamenton de la moralo. — Ĉapitro II. Aperetantaj elementoj de nova etiko. — Ĉapitro III. Morala principo en la naturo. — Ĉapitro IV. Moralaj konceptoj de primitivaj popoloj. — Ĉapitro V. Evoluo de moraldoktrinoj. — L'antikva Grekio. — Ĉapitro VI. Kristanismo. — Mezepoko. — Renesanco.

Allo, informservantoj !

Ni respondas al vi

Responde al la alvokoj en S-ULO n-roj 43 k. 45, venis al ni multaj informoj pri *lab. esp. informejoj* kaj korespondemaj *kom. infan-grupoj*, sed preskaŭ nur el Sovetio !

Ni ne ricevis informojn pri Aalsmeer, Cordoba, Paris, Lyon, La Rochelle, Rouen, Leipzig (du inform-servoj !), Wien, Minsk, Smolensk, Pskov, Tver, Saratov, Ĉita, Tiflis, Göteborg, Schweidnitz, Chemnitz, Berlin, Plzen, ktp., ktp.

Pli vigle, K-doj ! Ankaŭ la *rapideco* ĉiam gravas en la inform-serva afero ! Respondu la enketojn !



Oni demandas ĉe ni :

I. *Kio estas « Labesko » ?*

— Tio signifas « Laborista Esperanta Korespondejo ». Por tia « Korespondejo » eĉ sufiĉas **unu agema kaj kapabla K-do.**

II. *Kion devas fari « Labesko » ?*

1) Ĝi traduku el S-ULO k. el leteroj de propraj esp. korespondantoj diversajn artikolojn, informojn por naciaj lab. ĵurnaloj ;

2) Ĝi preparu saman materialon (artikoloj komunikoj, eĉ fotoj) por S-ULO kaj la reto de l' aliaj korespondejoj ; « Labesko » ne atendu, ke oni sin turnu al ĝi ; *ĝi mem devas proponi siajn servojn al la redakcioj ;* ne atendu tujan konsenton ; plej ofte simpatio al nia afero venas post obstina fruktodona peresper-laboro por la ĵurnalo aŭ gazeto, nur tiam.

3) « Labesko » proponas siajn servojn al lokaj klubejoj laboristaj, uzin-kolektivoj (ĉeloj), socialista aŭ komunista junularo kaj infan-grupoj por aranĝi peresp. korespondadon.

Ne atendu ke oni vin petu !
Proponu ĉie viajn servojn!

Komence vi devos traduki. Poste, vidinte la utilecon de esperanto, viaj prizorgatoj mem ellernos kaj aplikos la lingvon.

III. *Kion celas la enketoj en* S-ULO *n-roj 43 k. 45 pri « Labeskoj » k. « Kom. infan-korespondado » ?*

Ili celas submeti firman fundamenton sub nia interŝanĝado de materialoj, sub nia tuta laboro. Ni bezonas la adresojn por fiksi nian korespondejreton ! La rezultojn ni publikigos (hektografe aŭ alimaniere).

Labesko-SAT.

Kremenĉug.

Ĉe la Vegetaranoj

Dum la VI-a okazis la 1-a fakkunsido de l' vegetaranaj SAT-anoj. — La kunsidantoj akceptis la tezojn pri tio, ke la veget-movado, kies celo estas la racieca nutrado, devas pli forte sin apogi sur la laboristaj amasoj ; vegetarismo devas esti disvastigata inter la vicoj de l' proletoro, la morgaŭa mastro.

La taskoj de l' Vegetarana Fako estas : la popularigo de vegetarismo en lab. esp-rondoj kaj esp-propagando en la rondoj vegetaranaj.

La ĝenerala sekretario de l' fako estas K-do J. BRUKSON (Leningrad).

DNEPRANO.



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Studvojaĝo en Sovetrusio; la raporto de la sveda ŝtatoficista delegacio pri la vojaĝo dum aprilo 1925. El la sveda lingvo tradukis EINAR ADAMSON. Formato 16 × 23 cm., 36 pĝ. Ilustrita. Eldonanto: Sveda Ŝtatoficista Delegacio, Stockholm. Ricevebla el Sveda Laborista Esperanto Asocio, Göteborg I.

Laŭ la invito de la Ruslanda Unuiĝo de Ligilo (Unuiĝo de P.T.T.-laboristaro de Sovet-Unio), 5 poŝt- kaj telegraflaboristoj svedaj, inter kiuj 2 soc. dem. 1 kom. kaj 2 senpartianoj, vojaĝis al Sovet-Unio. Kompreneble ĉefe interesis ilin la laboro de siaj sammetianoj kaj la libro entenas resumon pri la historio, organizo ktp. de la Unuiĝo de Ligilo kaj ties rilato al la ĝenerala laboristaro soveta. Sed ankaŭ la delegitaro trovis tempon, en Leningrado kaj en Moskvo, por viziti laborejojn, malliberejojn, muzeojn ktp. kaj por eltrovi nombrojn pri laboristoj en diversaj metioj, pri salajroj, vidvadkostoj kaj sociorganizo ĝenerale.

Laŭ cititaj nombroj mi rimarkas, ke poŝta kuriero Moskva en okt. 1925, ricevis nur 42-60 rub. dum administra persono 96-225; ĉu la kuriera laboro malpli malsatigas la plenumanton ol la administra?

E. K. L.

La malgranda Johano de FREDERIK VAN EEDEN. Trad. H. J. BULTHUIS. N-roj 2-4 de Biblioteko Tutmonda. 1926. Formato 10 ½ × 17 cm. 183 pĝ. Eldonejo: Rudolf Mosse, Esperanto-Fako, Berlin SW 19. Prezo: Tuta 10-numera serio 4.— mk. g.

Frederik van Eeden estas unu el la plej famaj poetoj kaj aŭtoroj de Nederlando. Kvankam li ne estas esperantisto, diras la tradukinto en la antaŭparolo, kaj eĉ sin montris tute indiferenta pri la esperanta traduko de sia verko, li tamen ne kontraŭstaris la permespeton.

La malgranda Johano, kiu aperis dum la jaro 1886 estas fabelmisila prozo-poemo nun ĉie konata.

La libro ja estas tre leginda, kaj komencinte ĝin legi oni sen enuo avidas al plua sekvo. Preseraroj estas en ĝi maloftaj. Papero, preso kaj ekstera aspekto estas tre plaĉaj.

F. C. R.

Sur la vojoj al internacia lingvo. Artikolaro sub ĝenerala redakto de E. DREZEN. Ruslingva eldono de sovetlanda ŝtateldonejo. 1926. 168 pĝ., 14 × 22 cm. Prezo: 2 rubloj.

Nuntempe la aro da scioj ligitaj al la problemo de l' internacia lingvo formas ampleksan kaj multfakan sciencon. Ĝis nun ĉiu propagandisto estis devigata studi tiun ĉi sciencon « po-pece », t. e. laŭ granda aro da apartaj artikoloj aŭ libretoj, en kiuj la necesaj informoj estis dissemitaj, nefacile troveblaj kaj ordigeblaj. Feliĉe denun almenaŭ la ruslingvaj K-doj posedas vere kompletan verkon, kiu traktas laŭ pure marksisma vidpunkto la tutan demandaron pri la lingvo internacia.

En 15 artikoloj spertaj sovetlandaj esperantistoj (Demidjuk, Drezen, Evstifeev, Iodko, Javoronkov, Ĵirkov, Nekrasov, Revo, Spiridoviĉ, Vinogradov) per granda kvanto da trofe elektitaj faktoj, ciferoj kaj teoriaj argumentoj rakontas pri la historio, evoluo kaj nuna stato de la demando, neniam ripetiĝante neniel enuigante la leganton, ofte frapante lian menson per brilaj ekzemploj kaj analogioj.

Tiu ĉi libro estas plej serioza propagandilo, plej bona dokumentaro kaj estas dezirinde, ke aperu baldaŭ ĝia esperanta traduko, por ke ankaŭ alilingvaj K-doj povu profiti ĝian enhavon. Estas ĉefe atentinde, ke ĝin eldonis la ŝtateldonejo, kies ukraina fako estis jam antaŭe eldoninta la belan esperanto-lernolibron de Voleviĉ.

E. RETO.

Fundamento de Esperanto de Iv. LIDIN. 2-a eldono (11-35-a miloj). Eldonejo: « La Nova Epoko » Moskvo. 1926. Formato: 11 × 15 cm. 80 pĝ. Prezo: 15 kop.

Aperas jam, iom refarita laŭ la indikoj de l' praktiko, la dua eldono de tiu ĉi lernolibro tre populara en Sovetio. Antaŭ nelonge la sama lernolibro aperis en brajlaj literoj, por blinduloj. Ĝian larĝan disvastiĝon klarigas la originala metodo, uzita de l' aŭtoro. Principe li diras jenon: « Oni povas konatiĝi kun la mekanismo de esperanto per 1 1/2 — 2-hora legado de l' tuta lernolibro. Nenio estas lernota parkere: ĉefas kompreni la strukturon de la lingvo. Post unua aŭ dufoja relego de l' lernolibro oni komencu legi iun ajn literaturajon, komence kun helpo de l' vortaro, oni parolu kun K-doj, korespondu... »

Kiom tia viva, krea laboro, malsimilas la naŭzigan plenumadon da ekzercoj, kiuj svarmegas en ordinaraj lernolibroj!

E. RETO.

Universala Esperanta Lernolibro. (Parto I-a: *Por kursanoj;* Parto II-a: *Por kursgvidantoj*). De Dro A. MÖBUSZ. Eldono: Ellersiek & Borel. 1926. Formato: 14×22 cm. 116+32 pĝ. Prezo: I p. 2 germ. markoj, II p. 1.50 g. m.

Ne en ĉiuj lingvoj ekzistas bonaj esperanto-lernolibroj; plej ofte iliaj aŭtoroj estas specialistoj nek en pedagogio, nek en metodoj de esperanto-instruado. Tiujn du mankojn celas neniigi la zorge verkita kaj presita lernolibro de Möbusz. Ĝi estas vere universala, ne enhavante nacilingvajn tekstojn aŭ vortojn, do aplikebla en ĉiu ajn lando. Laŭ la metodo de l' aŭtoro, la lernanto mem finverkas la lernolibron, pleniganta la intence lasitajn blankajn spacojn per nacilingvaj tradukoj kaj notoj pri la *induktive* perceptitaj reguloj.

En la tekstoj la aŭtoro donas informojn pri esperanta movado, kaj montras sian *neneŭtralecon* per kompleta ignorado de la SAT-movado. Sed ni, pli honeste, diras tamen, ke la verko estas aĉetinda.

E. RETO.

Broŝuro kaj Folioj pri la aŭtuna foiro ĉe Frankfurt A. Main; folio al progresemuloj el Instituto Nyssens, rue Froissard, 129, Bruselo; **Parolado de prof. Paul Nyssens ĉe la XV-a Belga Esperanta Kongreso, Esperanto-Adresslipoj** (ekzempleroj), haveblaj ĉe Buchdruckerei Dr. Karl Pickert, G. m. b. H., Leitmeritz, Ĉeĥoslov.

GAZETOJ

Represis el « Sennaciulo ». — *Komuna,* Leningrad: « Soveta registaro estas stabila kaj vivados » (n-ro 40). — *La Flamme,* Francio, 12-6-26: « Kiel esperanto estas revolucia lingvo (35). — *Le Cri du Peuple,* Francio, 2-8-26: « Ondo de Memmortigoj en la lando de Horty (38), subskribita FEO, sed SENNACIULO ne estas menciita; ankaŭ 8-8-26: « La vero pri la helpo el Sovetio » (44); ne menciita nek SAT nek SENNACIULO. — *Bergische Arbeiterstimme,* Germanio, 12-8-26: « La vero pri la helpo el Sovetio » (44); ankaŭ 3-6-26: « Parazitaj Dividendoj » (34). — *Der Tâgliche Beobachter,* Germanio: « Proceso de laborgrupanoj » (42); neniu mencio pri SAT nek SENNACIULO. — *Zvezda,* Perm, 23-7-26: « Laborista Situacio en Hungario » (40).

Represis el « Sennacieca Revuo ». — *A Comuna,* Portugalio, 1-8-26: « La Kaverno de Zarathustra » (3-4, unua serio).

Enhavas notojn pri SAT. — *The Labour Woman,* London, 1-8-26: el letero de Dresdena SAT-anino. — *Sommar,* Svedio, 1926: priskribo de historio de SAT. — *Rheinische Lehrerzeitung,* 7-7-26: aludo al « Sekspsikologio » kaj al SAT-Biblioteko. — *Arbeiter-Zeitung,* Germanio, 17-7-26: pri la VI-a. — *Le Cri du Peuple,* Lyon, 18-7-26: pri la VI-a. — *Sâchsische Arbeiter-Zeitung,* Germanio, 14-8-26: letero pri la VI-a, de K-do O. Bässler. — *The Bournemouth Times,* Anglio, 24-7-26, 31-7-26 kaj 14-8-26: longaj artikoloj de K-do H. Stay. — *The Daily Herald,* London, 7-8-26: pri la VI-a. — *Le Droit du Peuple,* Francio, 2-8-26: pri la VI-a. — *Ruhr Echo,* Germanio, 9-8-26: Trad. el « Ni Legu » de Essen'a SAT grupo. — *Die Einheitsfront,* Germanio, jul. 26: pri SENNACIULO kaj la VI-a. — *The Shop Assistant,* Anglio, 14-8-26: artikolo de K-do M. Starr pri la VI-a. — *Sâchsische Arbeiter-Zeitung,* Leipzig, 2-9-26: longa artikolo de K-do O. Bässler pri nia VI-a.

Enhavas tradukaĵojn el esperantaj leteroj. — *Naŝ Putj,* Kremenĉug. 20-7-26. — *Proletarij,* Ĥarkov, 17-7-26. — *Die Komunistin,* Berlin. — *Bergische Arbeiterstimme,* Germanio, 7 n-roj 3-6-26 - 6-8-26. — *Zvezda,* Perm, 23-7-26.

Enhavas priesperantajn artikolojn. — *The Plebs,* London, aŭg. 26. — *Signalen,* Svedio, 5-8-26 kaj 29-7-26. — *Le Cri du Peuple,* Lyon, 8-8-26 (de loka FEO-grupo reklamanta pri « La Langue Internationale ». — *A Comuna,* Portugalio, 25-7-26.

Jen per kio ni propagandos

« Labesko-SAT » en Kremenĉug petas ĉiujn kongresistojn de la VI-a kiuj publikigos en gazetoj (*) siajn impresojn pri la VI-a, **pri Sovetio** (vojaĝ-impresoj, sovetiaj vivkondiĉoj, laboristaro, esperanto-movado ktp.) — ke ili alsendu almenaŭ po unu ekz. de tiuj gazetoj.

La kolektado de tiu materialo havas grandan propagand-signifon.

Tradukoj de la presitaj tekstoj (en leteroj aparte) estas dezirindaj kvankam ne devigaj.

Sendu ĉion al nia kompilisto:

V. Kolĉinski - « Labesko-SAT » Kremenĉug.

(*) Ekster sovetio.

ĈIUJ SAT-ANOJ

volos nepre posedi la aŭgustan kajeron de

SENNACIECA REVUO

kiu estas tute dediĉita al la historio kaj priskribo de la kongresurbo de nia VI-a.

Riĉe ilustrita.

24-paĝa, multvalora dokumento konservinda.

ENHAVO:

N. N. Ŝapovalenko: Urbo sur ostaro. Trad. *Nik. Vosarken.* — *A. S. Puŝkin*; Fondo de Peterburgo. Traduko *N. V. Nekrasov.* — *N. Gogol*: Nevski-Prospekto. Trad. *Ged.* — *Andreo Belyj*: Peterburgo 1905. Trad. *N. Nevein.* — *V. Aleksandrovskij*: Ribelo. Trad. *G. Rozenblat* †. — *V. Ĥolodkovski*: Malnova Peterburgo kaj Nova Leningrado. Trad. *Voldemaro.* — *R. Ivnev*: Peterburgo. Trad. *N. V.* — *I. E.*: Leningrado. Trad. *N. Vladimiroviĉ.* — *G. Ciperoviĉ*: Estonteco de Leningrado. Trad. *V. Duno.*

★

Mendu ĉe Administracio de SAT

Richard Lerchner

Leipzig O 27, Colmstrasse 1

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono: Gobelins 62-71